



Ĉeĥa Esperanto-Asocio

Medicinistaj informoj – Numero 3, Jarkolekto 1975

Cirkulero de medicinistoj, farmaciistoj, geflegistoj kaj la ruĝkrucaĵoj.

E L D O N A S : Ĉeĥa Esperanto Asocio - medicina sekcio, Jilská 10, Praha 1, CSSR

REDAKTAS : MUDr Josef Hradil, 29501 Mnichovo Hradiste 325, okr. Ml. Boleslav, ĈSSR

Lingva konsilanto: MUDr Josef Černý, 43401 Most, U věžových domů 376, ĈSSR

Aperas neregulare 4x en bezono de medicina sekcio

KIAMANIERE ABONI AL NIA CIRKULERO :

BRITUJO: Universala psoriazo-Asocio, Croft House, The Croft, Hastings, Sussex-T

FRANCUJO : MUDr Yvette Vierne, 5 rue Dr Houx, F 34, Montpellier, Francujo

G D R : Jurgen Hamann, PUCHAUER Str. N— 3, 705, Leipzig, DDR

HUNGARIO : MUDr Eva STANZ, Rákoczi u. 64 III/34, Budapeŝt', Hungario

BULGARIO: Georgi Popov, str. Stambolijski 41, 9850 Preslav

JAPANIO : Saburo Yamazoe, 371 Maebashi - Shi, Iwagami - Machi 4/8/9 Gunna-Ken, Jap

JUGOSLAVIO : MUDr Peter Zlatnar, Římská 7, Ljubljana - Jugoslavio

POLLANDO : MUDr Marian Laba, Szymanowskiego 2/4, 75-546 Koszalin, Pollando

RUMANIO: D-ro Gábor Lázár, str. Stepan Cel Mare 26/A, 4055 Covasna

USA: Esperanto 3318 N. Lake Shore Drive 801, Chicago, Illinois 6065

USSR : Ivan Paikin, Ŝvernika 7, korp. 3, kv. 44,117 449 Moskva V-449, USSR

Interesuloj en landoj, kiuj ne havas peranton, povas aboni MI rekte ĉe ĈEA kaj pagi per poŝtaj respondkupoj aŭ pere de libroj en la jara abonkotiŭo 3,5 US dolaroj, se vi povas pagi, do ne sendu ĉekojn.

PANORAMO - Literatura Almanako de Starto organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio
dufoje jare – sume por 16 Kcs aŭ 5 rpk

BAZAJ OKAZINTAĴOJ KAJ MALKOVROJ EN MEDICINO...

Se ni pritraktas eslorefikoj en medicino je la lastaj jaroj, ni vidas, kiel vastan amplekson ĉi tiu esploro okupas. Ĉe tio ni konstatas, kiel multe ĝi apogas sin je esploroj en aliaj sciencaj areoj, ekzemple elektrotekniko, atomfiziko, kemio k.s. Rapide disvolviĝas kelkaj medicinfakoj, kiel ekz. kolekula genetiko, biokemio, molekula biologio kaj vico da aliaj. Oni revizias kaj retaksas malnovajn sciencajn faktojn en klinika medicino. Krom sensaciaj ĥirurgiaj faroj, kiel estas transplantoj de la koro, hepato, reno, ni ekscias pri enkonduko de novaj kuracaj metodoj, artefaritaj artikoj, nukleaj stimulatoroj de korfunkcioj ktp. Vico de laboroj de scienculoj avertas pri nedezirataj efikoj de novaj kuraciloj. Ni ekvidu, kiel raportas la sekvon de novaj gravaj malkovroj la franca ĵurnalo „Semaine des hopitaux“ (1975). Kvankam la pritakso povas ŝajni malnova, necesas konsideri, ke la pravan pritakson de novaj malkovroj povas alporti nur pli da granda tempodistanco. **1965** Novzelanda kuracisto Dro Liley publikis novajn rezultojn de sangotransfuzoj por fetoj en matrinaj korpoj. Samtempe pruvas angla kuracisto Dro Wondrow kun kunlaborantoj, ke eblas malebligi imunigon de virino kun negativa RH (D) faktoro, se oni liveras al ŝi jam dum nasko

specifan gamaglobulinon. Dum kuracistaj tagoj en Dakar atentigis vico da kuracistoj pri kanceriga efiko de la plejmulto de arakidoj. En Parizo oni decidis ekipi la veturilojn de fajroestingistoj per superprema kamero pro onaj rezultoj de superprema oksigeno ĉe personoj, venenigitaj per karbonoksido. - Artefarita koro estis konstruita far grupo de eksperimentaj laboruloj en Boston. Ĝi estis alligita per artefarita kunigilo kaj sukcesa anstataŭi funkcion de la koro ĉe eksperimentaj bestoj. Amerikaj kuracistoj Dro Bilgutay kaj Dro Lillehay evoluigis elektronan maŝinon, kiu incitas karotikan sinuson, lokon kun multaj nervaj fadenoj, kaj malaltigas tiamaniere altan sangopremion ĉe superpremuloj. Esperigaj rezultoj estis gajnitaj dum eksperimentoj kun hundoj.

1966 Dum transplantoj de organoj estis pruvita pli bona toleremo rilate al transplantoj ĉe tiuj maturaj bestoj, al kiuj antaŭ transplantado estis forigita timuso. / La grupo de antibiotikoj ĉijare estis riĉigita per nova speco - cefalosporinoj. Uzeblaj estas du variantoj: cefalotin/p (Keflino) kaj cefalopridin/o (Ceporino). - Amerikaj kuracistoj konstruis „pace-maker“ (paŝigilon) stimulatoron, ordigantan korritmon. Ĝi ekagis en la momento, kiam la intervalo inter du koraj kuntirigoj abnorme trolongiĝas - Ĉinaj sciencistoj produktis laboratorie biologie aktivan sintezan inzulino. Sed la industria produktado estis tro multekosta, kaj pro tio oni ne povas ĝin enkonduki. - En Usono estis malpermesitaj provoj je homoj per la materio signita DMSO (dimetilsulfoksido). La solvaĵo DMSO rapide absorbiĝas tra la haŭto eĉ tiam se ĝi estas riĉigita per aliaj materioj. Ĝi havas signifan kontraŭ inflaman efikon. Sed la provoj je bestoj montris, ke DMSO kaŭzas grandajn pertubojn de la vidsenco. - J. Marmarston kaj kunlaborantoj sekvis dum 11 jaroj influon de estrogeno (virina ovaria testo pruvigis, ke asparaginazo (fermento, kiu solvas asparagino) plene detruas leŭkemiajn ĉelojn / La biologoj de medicina fakultato en Lille malkovris novan detektigan teston, kiu ebligas dum du minutoj konstati per imunologia maniero ĉeeston de reŭmata faktoro en sanga serumo – Estis malkovrita nova kuracilo RUBDOMICINO. Ĝi estas la unua antibiotiko efikanta kontraŭ mejloblasta leukenio (maligna akuta blanka sangereco). La unuan fojon uzis ĉi tiun kuracilon profesoro Bernard kaj kunlaborantoj – Estis malkovritaj pliaj sintetikaj materioj, kiaj baras na nestiĝon de la ovoj en uteroj de laboratoriaj bestoj kaj estas kapablaj eĉ eligi la malfirme fiksitajn feton. - En aŭgusto 1967 ekestis ĉe du laborejoj (GFR) epidemio de laborantoj, eksperimentantaj kun histoj kaj sango de simioj, evenantaj el orienta Afriko. Tridek personoj estis atakitaj per viruso el grupo de arbovirusoj, kaŭzantaj febrojn, cefaleon, konjunktivitajn, muskolajn dolorojn kaj tetecan ekshaŭstiĝon – Spe malsanuloj mortis. La viruso estis nomita laŭ la loko, kie ĝi aperigis „Marbourg“. La sukcesoj de „pace-makeroj“ ĉe stimulo de la kora funkcio instigis kuracistojn al eluzo de tiu metodo ankaŭ ĉe aliaj organoj. Ĥirurgoj el la universitato en Yale eluzis „pace-makeron“ por stimulo de diogragmo ĉe malsanuloj kun difektitaj spircentroj kaj Dro Hopwison (Anglujo) pruvigis stimuli paralizitajn afinkterojn de anuso – Francaj Ĥirurgoj realigis transplanton de bovida valvulo anstataŭ la misformiĝinta valvulo de la 44-jara virino. La pacientino foriris el la hospitalo post 6 semajnoj en tre bona stato. / Unuan fojon en Eŭropo estis sukcesinta la disdivido de sango el cirkulacio de sango per kontinua maniero. La maŝino estis ligita al la sangocirkulacio de la sangodonacanto kaj direktis la sango en centrifugon, kie la partetoj de sango estas disdividitaj laŭ sia denseco; post forpreno de leŭkocitoj la sango revenas al la sangodonacanto – Ĥrpfesoro Barnard faris unuan transplanton de koro surbaze de eksperimentoj de Dro Shumway. Tio okazis la 3-an de decembro 1967 en Kapstado ĉe paciento Washkanski. La malsanulo post kelkaj tagoj mortis. Post kelkaj tagoj transplantis la koro Dro Shumway kun Kantrewitz en Novjorko.

1968 Profesoro Barnard komencas kuraci leŭkemion per asparaginazo – Japanaj sciencistoj unuan fojon sukcesis kulturi bacilon de Hansen, kiu kaŭzas lepron – En Philadelphio estis provata trivakcino kontraŭ morbilo, rubeolo kaj parotito – La 8-an de januaro, monaton post la unua provo, efektivigis profesoro Barnard plian transplanton de la koro, al Dro Baliberg. Post 5 tagoj profesoro doktoro Shumway faris la kvaran kortransplanton ĉe la homo. Zla unua transplantado de koro en Eŭropo estis farita en la kliniko de Dro Canrol kaj Dro Quiraŭdon de 27-an de aprilo 1968 sed sen sukceso. - Usona doktoro Falsetti faris tre interesan operacion: li forigis el la malsana koro nefunkciantan parton de la kormuskolo – Ofte estas konstatata evoluo de kanceraj tumoroj post transplantado de renoj kaj kuracado per imunosupresivoj; estis priskribitaj eble 20 kazoj – Profesoro Berom el Gand faris kun sia kolektivo unuan sukcesintan transplanton de pulmo ĉe 23-jara

malsanulo trafita per grava silikozo – Traumatologia bilanco de olimpiaj ludoj> 710 vundiĝoj – Anglosaksaj kuracistoj pruvis, ke la personoj kun ĥromozomoj en la vico XYY estas 50-60 foje pli juĝe punitaj ol alia populacio – Dro Rone pruvis, ke la larmiga gaso, uzita en la jaro 1968 dum demonstracioj en Parizo – ĥloracetofenono – provokas krom irito de konjunktivo kaj haŭto ankaŭ lezon de centra nerva sistemo. En Amsterdamo estis establita eŭropa sangobanko por frostigita sango de raraj tipoj.

1969 La unua sintezo de fermento estis sukcesinta samtepe al du grupoj da esplorintoj. Ĝis estis fermento ribonukleazo, produktita de kemiistoj de Rockefeller-universitato kaj en laboratorioj de Merck – Amandatino, medikamento uzata ĉe kuracado de gripo, favore influas malsanon de Parkison (nerva malsano kuniĝanta kun tremo). Kiel konstatis Dro Schwab el Boston, kiu provis efikon de amantadino ĉe 163 parkisonuloj – Laŭ Dro Carlo Valensi eblas punkcio de fetaj membranoj diagnozon de kelkaj anomalioj jam ek de la oka graved-semajno. Analizo de feta likvoro eblas konstati kelkajn ĥromozonajn anomaliojn. - Profesoro Bernstein el Aŭstralio malkovris novan hormonon de hipofizo. Ĝi havas similan efikon kiel inzulino. - Dro Cohen el infana hospitalo en Buffalo konstatis, ke infanoj naskitaj de virinoj, kiuj uzadis LSD, ofte suferas per ĥromozomaj ŝanĝoj. - Post 18 kaj duono de monato mortis Dro Nlaiberg, ĉe kiu faris profesoro Barnard transplanton de koro. Sekco montris, ke la transplantita koro estis denove trafita per aterosklerozĉo. - Dro Evguan okaze la kongreso de ginekologoj pruvis, ke unu el relative oftaj kaŭzoj de sterileco estas aŭtoimuneco de la viro kontraŭ propraj spermioj. Ĉe 38 sterilaj viroj li trovis tiun nemimunon 21 foje. Ĉe virinoj estas tiu immuno pli rara.

1970 D-ro Thorana, portanto de Nobelpremio en la jaro 1968 pro sia laboro pri nukleaj acidoj, realigis unuan sintezon de geno kapablan inciti produkton de ribonuklea acido. Rifampicin, antibiotiko kun granda efikeco kontraŭ tuberkuloza bacilo, montriĝis efika kontraŭ bacilo de lepro. - Estis malkovrita nova antibiotiko adriamicino – simila al rubidomicino. Tiu antibiotiko estas efika kontraŭ Hodgkinmalsano (grava malsano de limfatikaj nodoj) ĉe rabdomisarkomo (muskola tumor), estas pruvita la efiko de bleomicino, antibiotiko malkovrita far japanoj en la jaro 1966, kontraŭ kancero de penis kaj vulvo. - Usonaj kuracistoj pravas, ke gripa viruso havas teratogenan efikon (ĝi malfavore influas fetan materion, ili apogas sin sur statistiko, kiu pravas signifan pligrandigon de deformiĝoj de fingroj ĉe la naskitoj post epidemio de gripo en Usono en la jaro 1963. - Estas pruvite, ke sukero estas pli danĝera ol graso. Ĉe ekesto de aterosklerozo estas pli grave konsiderendaj perturboj de glukozaj metabolismo. - Estas versimile, ke herpesa viruso provokas tumoran kreskon, kiel estis konstatite ĉe bestoj. La kuracistoj de Universitato en Emora pravas eblan influon de viruso al kresko de tumor de utera cerviko (kolo) ĉe virinoj, ĉar ili trovis seruman antigenon ĉe 83% da virinoj, trafitaj per kancero de utera kolo, dum ĉe alia virina populacio estis la antigenoj trovitaj nur en 33%. = En kelkaj Eŭropaj landoj komenciĝas aperi kazoj de ĥolero, fortrenitaj tien en lokoj el epidemia apero de ĥolero, el landoj de fora Oriento (Hindio, Indonezio, Barmo, Pakistano). Unuan fojon estis uzitaj nukleaj koraj stimulatoroj. La 27/an de aprilo 1970 estis en la kliniko de prof. Dubost implantita kardiostimulatoro pere de prof. Laurens. La fonto de energio estas kreata per 150 milionoj da gramo de plutonio 238, kiu funkcias minimume dum 10 jaroj. - El 18 operaciitaj malsanuloj ĉe kiuj faris prof. Starlz transplanton de hepato en la jaro 1967, 6 da ili transvivas pli ol 1 jaron. - Post la sukceso kun protezo de koxa artikolo, komenciĝas aperi pluaj artefaritaj substituoj de diversaj artikoloj. La plej grandan progreson tiudirektan havas artefarita substituo de genua artikolo. - Disvastiĝis ebloj de kuracado de korkronaj arterioj, estis evoluita metodo de kuniĝo de aorto kun koronariaj arterioj. Ĝi bazas en implanto de la vejna grefto kaj al aorto kaj sub la lokon de korkrona difekto. Ĉi tiu transpontiĝo povas esti duobligita aŭ triobligita. En la kliniko de Cleveland estis tiamaniere operaciitaj 602 malsanuloj. - En franca merkato aperis kolora rentgena filmo mediĥromo, ebliganta multe pli grandan amplekson da informoj ol nigroblanka filmo. - Ni vidas, ke la medicina scienco trovas ĉiam pli da rimedoj por savo da malsanuloj. Per la esploro kaj verifado de rezultoj en praktiko, okupiĝas multaj laborejoj en la tuta mondo. Ofte montriĝas la danĝero de la novaj kuracmetodoj aŭ por la malsanulo mem aŭ por la sekvaj generacioj. Eĉ kiam novaj malkovroj estas tre ofte faraĵo de pli grandaj laborejoj, malgraŭ

tio la krea fantazio estas necese kondiĉo de pli grandaj malkovroj eĉ dum la tempoperiodo de regado de ekzaktaj sciencoj.

Komisurotomio ĉe pli maljunaj personoj (Sovetskaja medicina 37,12:64-67-1974).

Operacioj de koro dum tempoprogreso estiĝas ĉiam pli ordinara ĥirurgia metodo. Unu el problemoj, kiuj ankoraŭ ne estas sufiĉe klarigitaj, estas, siagrade estas indikita operacio de mitralo (dupinta korvalvo) ĉe personoj pli aĝaj ol 40 jaroj. Ĝis nunaj statistikoj ŝajnas atesti pri tio, ke la reŭltroj de ĉi tiu operacio do ne estas ĉe pli aĝaj personoj tiel sukcesaj. Estis observitaj du grupoj po 94 malsanuloj kun mitrala stenozo. Unu el ili estis ĝis 40 jj kaj la dua super 44 jj da aĝo. La pacientoj de ambaŭ grupoj estis konservataj dum 2 ĝis 16 jaroj post la operacio. Montriĝis, ke ĉe pli maljunaj pacientoj estas ĉi tiu operacio indikita dum la supozo, ke ne ĉeestas samtempe akuta reŭma korinflamo kaj ke ne estas signoj de insuficienco de cirkulado. Malfruaj rezultoj de tiuj pli maljunaj operaciuloj atestis, ke vico da ili povis vivi multe pli aktive ol antaŭ la operacio. Eble ĉe triono da malsanuloj oni povis la rezultojn signi bonaj. Morteco ne estis pli alta ol ĉe pli junaj. La elekto de malsanuloj por operacia solvo devus esti direktata per la samaj vidpunktoj.

Kuracado de komencaj stadioj de korinfarkto (Munchener medizinischer Wochenschrift, 116:485, 1974)

La konoj pri patogenezo de korinfarkto estiĝis bazo de nova kuraca plankoncepto ĉe tiu malsano. Trombozo, kiu ĉeestas ĉiun infarkton estas neŝanĝebla fina stadio post longa vico da patologiaj ŝanĝoj de vaza muro de korkronaj arterioj. Komence temas pri nespecifa nesenhina reakcio post sklerogena difektiĝo; tio gvidas al perturba metabolismo kaj al prolifero de ĉeloj de arteria muro. Tion sekvas dikiĝo de la vaza intimo kaj per tio ekesto de kromvaza stenozo; per la difektiĝo de endotelo poste sekvas kronvaza trombozo. Tiu procedo povas estiĝi salte, dum kio la vazoj estas ĉiam pli malvastaj. Ek de dikiĝo de intimo ĝis produkto de neŝanĝebla vaza trobo, daŭras kutime 5 ĝis 7 horoj, dum kio ĉeestas tipaj subjektivaj kaj onejktivaj signoj de infarkto. La celo de la terapio tial estas influi komencan stadion, nome per uzo de glukokortikoidoj kaj heparino, kaj estas kapablaj moderigi efikmaniere doloron. La sukceso de la terapio de ĝia frua elkonduko.

* * *

Tumoroj elvokitaj per radiado (Lancet,7852,277-279,1974)

Dum la jaroj 1949/1960 ekestis amasa imigracio de la loĝantaro de Norda Afriko kaj de Meza Oriento en Izraelon. Ĉe la plejparto da imigrantuloj estis konstatita funga malsaniĝo de la harparto de kapo. Proksimume 17 mil da infanoj estis mallonge priiradiciitaj per supraĵa dozo. Eble 11 mil infanoj povis poste esti observataj dum 12-23 jj. Por komparo servis du grupoj de nepriiradiciitaj infanoj. La studo pruvis, ke ĉe pri iradiciitaj infanoj estis signife pli alta risko ekmalsaniĝi pro tumoroj de kapo aŭ nuko. Antaŭ ĉio temis pri tumoroj de cerbo, parotido kaj tireoido. Relative alta, sed statistike ne signifa estis apero de leŭkemio. En la menciita tempoperiodo estis post tiu iradiacio 27 tumoroj de kapo kaj nuko el tio 6 tumoroj de tireoido kaj 4 tumoroj de parotido. Samtempe estis ĉe la observata grupo de iradiaciitaj infanoj pruvitaj 12 benignaj tumoroj. Malignaj tumoroj manifestiĝis meznombro post 5 jaroj da latento.

REŬMATISMO kiel monda problemo. Zdravotnické noviny 6/75

La 13-an internacian kongreson de reŭmatologoj partoprenis en japana urbo Kioto du mil kuracistoj el 60 landoj de la mondo. Eksterordinaran signifon de reŭmataj malsanoj atestas ekzemple la fakto, ke en Usono la triono de pacientoj, venantaj al kuracisto, havas reŭmatajn malsanojn. Tial far multaj ĉeestantoj estis akcentata la neceso, baze plibonigi erudicion de kuracistoj pri tiu ĉi fako, al kiu estas ankoraŭ daŭre aljuĝata nesufiĉa graveco, same kiel al la sociologaj kaj psihologaj problemoj intertrialataj kuracadon de tiuj malsaniĝoj. Postuloj pri erudicio memkompreneble egalmezure koncernas ankaŭ flegistinojn, fizioterapeŭtojn, sociologojn, psihologojn, kiuj devus esti ellernitaj en grandaj centroj, kie krom ellerno ili havus eblon de praktika ekzercado. Granda problemoj tiurilata estas ankaŭ klerigo de malsanuloj, kiuj devus ricevi solidajn informojn pri sia malsaniĝo kaj samtempe ili devus ŝirmataj antaŭ kvanto de „miraklaj“ kuraciloj.

Stabilan lokon en diagnozo de reŭmatismaj malsanoj jam gajnos artroskopio, pri kiu referis Gil el Meksikio. Li kontrolis kaj komparis la rezultojn de ekstera esploro de artikoj kaj endoskopio, kaj

konstatis, ke ĉe endoskopio la rezultoj estis nekompareble pli precizaj kaj senfalsaj pozitivaj diagnozoj. Ripetita artroskopio povas dum certaj cirkonstancoj gvidi ankaŭ al subteno de saniĝa procedo. Pri la sama metodo referis ankaŭ Dorfman el Francio. La operacieto estas farata en loka anestezio kaj helpe de ĝi oni povas limigi kaj precizigi alimaniere neklasifikeblaj kazoj de reŭmatismaj malsaniĝoj. Artroskopia trovo ĉiam respondis al histologia bildo, krom kazoj de sklerozaj artikaj ŝanĝoj. Grandajn tiurilatajn spertojn havas Watanabe el Japanujo, kiu per speciala instrumento faris jam 15 000 artroskopiojn de genuaj artikoj. Artroskopo havas diametron de 1,7 milimetro, ĝi estas ekipita per lenso kaj ebligas fari ne nur fotografaĵojn, sed ankaŭ 16 mm koloran filmon, sur kiu estas bone diferenceblaj lezoj de artikaj ligamentoj, meniskoj kaj inflamaj artikaj ŝanĝoj. Yates el Anglio uzis dum artroskopio injekcion de radioaktiva Itrio 90 kaj atingis ĉi tie bonajn kuracajn efikojn. Scott el Anglio surbaze de artroskopie gajnitaj eroj de materialo konstatis, ke konstruinflama kuracado efikas unue sur supraĵaj tavoloj de sinovio kaj nur poste penetras pli profunde. Pri la rezultoj de osta scintigrafio referis Handilla kaj Pfannenstiel el GFR kaj komparis ilin kun rezultoj de rentgena esploro. La rezultoj atestis unusignife por scintigrafio, dum kiu la nombro da ĝustaj diagnozoj ĉe ĉeestantoj patologiaj ŝanĝoj estis pruve pli alta ol ĉe rentgen-esploro.

Baza parto de kongreso estis dediĉita al terapio. Kiel la unua prezentiĝis Boŝmanský el ĈSSR, kiu okupiĝis pri profilakso de reŭmatisma febro, signifo de hormona kuracado kaj per longtempa aplikado de penicilino. Objekto de vigla diskuto estis problemo, ĉu apliki ĉe indikitaj artikaj malsaniĝoj hormonojn longtempe aŭ intermite. Unuiĝo pri tiu problemo ne estis atingita. Sanger el GFR referis pri efiko de kuracado de infanoj per Indocido. Sekve de tiu kuracado reagis bone antaŭ ĉio artikoj sen visceraj ŝanĝoj. Kromefikoj estis raraj. La kuracado ebligis timigi dozojn de hormonoj. Bladio el Italio kaj Igarashi el Japanio komparis efikojn de indocido kun ibobrufeno. Dum la unua medikamento efikis favore ankaŭ kontraŭinflame, havis ibobrufeno nur kontraŭdoloran efikon. Japanj sciencistoj havis kun ISOBRUFENO bonajn efikojn ĉe 70% da kuracitaj pacientoj. Wagenhauser el Svisujo same opinias, ke ISOBRUFENO konvenas antaŭ ĉio ĉe meze doloraj kazoj. Armor el Francio defendis opinion, ke dum longtempa terapio estas preferinda INDOMETACINO. Franchimont el Blegio prezentis raporton pri novaj nehormonaj kuraciloj, el kiuj dume en stadio de eksperimentoj estas: en Usono NAPROKSENO kaj MK-231, en Italio FTALAZINDOINO kaj en Francio ketaBRUFENO. Kontraŭdolora kaj kontraŭfebra aktivbecoj estas ĉe tiuj novaj kuraciloj proksimeme samaj, ĉe MK-231 estas iom malpli alta kontraŭinflama efiko. Sed la kuracilo estas bone tolerebla kaj praviĝis ĉe koksartrozo kaj spondilartrozo. Same ĉe Beŝtjereva malsano ĝi ŝajnas havi bonan rezulton kaj simile ĉe urika artrito. Laŭ ĝisnunaj spertoj oni povas diri, ke la medikamento estas pli bone tolerata ol ĝisdate ofte aplikata acetilosalicila acido.

DIFEKTITAJ MUSKOLOJ RESANIGEBLAJ

Neues Deutschland, Berlin, 30(1975),77,p 4, esperantigis Jurgen Hamann, Leipzig Moskvo (ADN). Procedon, per kiu oni povas restaŭri difektitajn muskolojn, ellaboris la soveta biologo Aleksandr Studitski en 25 jaro laboro. La resaniga procedo, pruvita per besteksperimentoj, naziĝas sur la kapablo de la muskola histo regeneri sin dum certaj kondiĉoj. Oni dispecigas la eltranĉitan muskolon kaj remetas ĝin. Sub la influo de stimuloj kaj de la ĉirkaŭaj histoj kaj nervoj la fibrecita muskola substanco denove alprenas la originan formon de la eligita muskolo, ties funkcioj restaŭriĝas.

Lau la opinio de la sciencisto la novkonstruiĝon de la muskolaj fibroj efikas tiel nomataj „satelitaj ĉeloj“, kiuj videblas nur per elektrono-mikroskopo. Studitski rigardas la novan procedon ŝancorica por la kirurgio. La ĉefa problemo nun konsistas en la venko de certaj defent-reakcioj de la organismo.

AKTIVECO D ESPERANTISTOJ MEDICINISTOJ

en la mondo – koncize laŭ la jarraporto de UEMA far de ĝia eŭropa sekretario Dro Imre Ferenczy. La jarkunveno de esperantistoj – medicinistoj en kadro de la Universala Kongreso okazis la 31-an de julio 1974 je 1300 ĝis 1500 en la kongresa salono Kabe en Hamburgo. Vastan kaj precizan jarraporton pri aktiveco de esperantistoj – medicinistoj en unuopaj landaj antaŭmetis la eŭropa sekretario Dro Imre Ferenczy el Győr – Hungarujo. Plifortiĝis la kontaktoj inter la estraro kaj

membraro, precipe per persona vizito de la sekretario en pluraj eŭropaj landoj. En Ĉeĥoslovakio estas eldonata cirkulero Meidcinistaj informoj. En Slovakio aperadis regule en la gazeto „Esperantisto slovaka“ ankaŭ Medicinaj paĝoj, redaktitaj far de Dro L. Izak. El Pollando sendis jarraporton Drino Jarnurskiewicz. Ŝi informis, ke en Pollando estas pli ol 150 esperantistoj-medicinistoj, sed el ili nur kelkaj estas aktivaj. La landa delegito en Bulgario raportis, ke en Sofio funkcias medicina grupo esperantista. La Hungara filio informis pri aktiva laboro de la Budapesta faka grupo en la hospitalo Laszlo, Budapesto. Ĉiujare oni okazigis sciencajn vesperojn. Japana Esperanta medicina Asocio regule eldonadas ĉiujare du numerojn de la revuo MIR (Medicina Internacia Revuo). Dro Ferenczy aldone skizis la taskojn de la asocio. En la diskuto Dro Valjan el Kanado demandis la estraron pri la organo MIR kaj pri ĝia kontakto kun UEA. Li ankaŭ proponis specialajn subfakojn de UEMA. Dro W de Smet parolis pri la reorganizaj laboroj inter medicinistoj en Belgio. Post oni proklamis la rezultojn de la voĉdonado (skriba) pri elekto de la nova estraro: prezidanto prof. Kato, vicprezidantoj: dro Salnikov 1 dro Abault, Ĝenerala sekretario prof. Yamazoe, ĉefkasisto Dro Barasi, unua inspektoro Dro Yamage, dua inspektoro Dro Kempeneers, sekretario por aŭropaj landoj Dro Ferenczy. Dro Shinoda anoncis la rezulton de la donado por la unuafoje UEMA-premio. Ĉi jare du hungaraj kuracistoj Dro Istvan Hagyi kaj Dro Janos Torok gajnis la arĝentan medalon. Krome Dro Hagyi ricevis 200 nederlandajn guldenojn kiel Premian monon. Ĉar ambau premiitaj hungaraj kolegoj ne povis ĉeesti, Dro Imre Ferenczy transprenis la medalojn kaj dankis en la nomo de ambaŭ premiitoj. La kovenon ĉeestis 40 gekolegoj el 12 landoj. Post la kunveno sekvis vizito al la tropika instituto en Hamburg kaj vespere la solena bakado okaze transpeno de la UEMA-premio, kiun dediĉis Dro Shinoda por festi la unuafojan okazon de la transdono. (Laŭ MIR).

MEDICINISTA SCIENCA VESPERO

Lige al la sesjara datreveno de la fondiĝo, la anoj de la medicina grupo la kvaran lundon de februaro aranĝis sian kutiman jaran sciencan vesperon. Dank'al lastjara sukcesa prelegserio multaj scivolemaj esperantistoj vizitis la ĉiĵaran okazintaĵon.

Post la enkondukaj vortoj de Dro Ludoviko Molnar, fondisto kaj sekretario de Medicinista Grupo, unue Drino Inren Szabo prelegis pri devigaj imunigaj vakcinadoj en Hungario. Sekvis Drino Juliana Farkas, prelegante pri anatomio de la okulo. Flua uzado de la lingvo surprizis eĉ tiujn ĉeestantojn, kiuj ankaŭ pasintjare povis konvinkiĝi pri la alta nivelo de la ĉefurbaj medicinistaj esperanto-prelegoj. Helpe de demonstraĵa objekto kaj la desegno sur la nigra tabulo eĉ nefakuloj povis sekvi la interesan temon. Post la detale anatomia konigo oni povis aŭdi pri la operaciaj temoj kontraŭ glaŭkomo kaj kaŭzoj de la tn. Tubvido. La trian prelegon prezentis Drino Eva Stanz kun titolo „Speciala temo de rehabilitado de infanoj movorgana malsano de Germanio“. La prelegon ŝi kompilis laŭ la esperantlingva raporto de s-anino Anneliese Bepperling-Wolff el Hamburgo. Oni eksciis, ke terapia rajdado havas multajn sanigajn efikojn. Post la historiaj fonoj de tiu ĉi kuracmetodo, sekvis novaj rezultoj, kiujn oni atingis ĉe dismeliuloj, ĉe t.n. „Kontergan-infanoj“ k.a. Laŭ la novaj spertoj terapia rajdado estas bona rimedo ankaŭ kontraŭ astmo, kormalsanoj k.s. - Drino Ilona Bikazadi prelegis pri „Distresa“ sindromo ĉe la novnaskitoj. Ŝi komence parolis pri kazoj trovitaj ĉe kelkaj antaŭtempe naskitaj. Ĉe tiuj novnaskitoj malbone funkciadas la aneroba glikoliza sukermalkonstruado, kaj sekve de tio ilia origina bufro-sistemo malbone funkcias; oni trovas fortan acidozon. En tiuj kazoj – por celi normalan spiradon de la etuloj – oni uzas natrian hidrogenan karbonaton por reguligi la bufrosistemon. El la alparoloj oni eksciis, kiel danĝera estas la fumado de gravedaj patrinoj dum la graveda tempo. Ili ne nikotino, sed multajn fruktojn kaj vitaminojn bezonas. - Lastan prelegon de la serio prezentis Dro Ludovika Molnar. Pere de originalaj japanaj diapozitivoj li enkondukis eminentajn ekzemplojn de la nuntempe tre grava kaj aktuala problemo: pri malpurigado de la homa ĉirkaŭmedio. Detalaj kaj esprimivaj fotoj demonstris pri la efiko de hidrargo kaj polihlorida difendilo en Japanio. Sekvonttage ankaŭ la vespera ĵurnalo (Esti Hirlep) informis pri la prelegserio.

EL LETEROJ DE ABONANTOJ - medicinan literaturon eldonitan en GDR havigos al vi senprokraste Jurgen Hamann, DDR-705 Leipzig, Puchauer Strasse Nro 3.

BRITUJO: Susseĉ

Membroj de Brita Esperanto-Asocio havas du gazetojn: unu presita esperante dua angle. En ambaŭ ĵus aperis artikoletoj pri utileco de „Medicinaj informoj“ por britaj abonantoj.

RIDO – estas duono de sano

KURACISTA KONSILO – plej fidinda savilo

- Jam multfoje mi songis

Ke mi dronas en maro.

Ĉu konsilon vi donus,

Kontraŭ tiu koŝmaro?

- Por en nokto kuraĝi

Por la dorson domaĝi,

Estas jena rimedo:

Lerni vi devas naĝi.

Aŭtoro Romano Grinŝpan, fak-delegito de UEA, ul. Sajfalina 4, Visokovoltnij masiv, 700125 Taŝkento

NEPRE LEGINDA LIBRO

Josef Nesvadba - La perdita vizaĝo

Eldonis Ĉeĥa Esperanto Asocio,

tradukis Adolf Stanura

Formato 112 pĝ, 12,4x20cm

Eldonkvanto: 5000 ekzempleroj

Prezo: Broŝurita 15 Kr (1,25 USD, 6 RPK)

Mendebila ĉe Ĉeĥa Esperanto Asocio, Jilska 10, 110 00 Praha1, Ĉeĥoslovakio

El la recenzoj: La perdita vizaĝo reliefe elstaras super multaj samspecaj volumoj, dank'al la multifaceta invent- kaj esprim-kapablo de la aŭtoro, Josef Nesvadba, kiu liveras al ni ĉi tie dekon da streĉe atentokaptaj, sufiĉe ampleksaj kaj kompleksaj rakontoj, kiuj spacas de nure viturozistaj priskriboj pri lastmilitaj kaj kontraŭfaŝismaj okazintaĵoj, ĝis gangsteraj, spionaj, sciencfikciaj intrigoj, kaj ĝis pli engaĝitaj, psik-enpenetraj, pensigaj temoj pri la dubindo de la nuntempa kaj estonta evoluprogreso, pri la konsternaj perspektivoj de sciencaj atingoj ktp. Aldo de Giorgi